# Mortfesto de Finnegan

*James JOYCE*

tradukita ĉe ekstelu.info

## Book I / Chapter 1

3

riverkuro, preter preĝejo "Eve kaj Adam", de bordo kurba ĉe golfeto fleksita, alportas nin per agrablaj cirkonstancoj kaj recikladeco, denove alkastele "Howth" ĉirkaŭaĵa ekeĉo. [1]

Sinjoro Tristram, violisto de amantoj, sur la maro mallonga, ankoraŭ estis revenonte el Amorica Norda en ĉi-flanken la malebena krutaĵ-istmo, Eŭropo Minora, manprenbatali lian militon penizolatan [2]: nek ĉefulaj rokoj "Sawyer" ĉe la fluo "Oconee" troigis sin mem al ne-ciganoj en distrikto "Laurens" kiam ili iris petante duoblan nombron ilian tut-tempe [3]: nek voĉo elfajra balgblekis muĝe, muĝe albapti vin malpetruze: ne tiam, sed baldaŭ ĉasaĵoj poste, plej junul' estis igonte blindan Isaakon [4]: ne tiam, kvankam tute justas, fratinaj petoluloj estis koleronte je du-unu nat-johano. [5] Putru iom da malto fermentita per Ĵem aŭ Ŝen je arklumo kaj luksema finiĝo de ĉielarko estis ekvidata per sonor-rondo en la akvo-vizaĝo. [6]

La falo (bababadalgharaghtakamminarronnkonnbronntonner-ronntuonnthunntrovarrhounawnskawntoohoohoordenenthur-nuk!) de iama murrekta pliaĝulo estas rakontita frue en lito kaj poste en vivo tra tuta muzika Kristana ministerio. [7] La granda falo malsupren de muro kunportis malmulttempe la malbonkorpon de Finnegan, eterna solida homo, ke ĝia ĝibkapo sendas senprokraste iun nedemandanton pli okcidenten serĉante ĝiajn piedfingrojn tre tumultajn: kaj ĝia suprenvers-voj-punkto lokas ĉe la frapo en la parko kie oni restigis oranĝojn rustigitajn surverden ekde Dublino unue amis Liffey. [8]

4

Kiaj disputoj ĉi tie de voloj kontraŭ maloj, sufokante diojn de Ostrogotoj kaj Visigotoj! Brékkek Kékkek Kékkek Kékkek! Kóaks Kóaks Kóaks! Ualu Ualu Ualu! Kaŭouauh! [9] Kie la pra-glav-uzantoj ankoraŭ penas ekmastri etajn armilojn, grenadojn, kaj trafarantojn katapultante balistikegojn ekstere el blank-knabojn de terkapo "Howth." [10] Alsieĝatejoj kaj sonoregondoj. Bienuloj, teruru min! Sanglorantoj, ŝparegu! Armiloj sonoras kun alarmoj, abomeninda. Kiliki-lik-ili, sonoregado. [11] Kia sorto mortiga, kiaj kasteloj ventolataj! Kiaj petitoj amas, delogitaj de kiaj uloj indaj, absolvataj! [12] Kia ver-sento por pajl-haro ilia kun kiaj fort-voĉo de malvereco. Ho, jen, ĉi tie, iel etendite trafis la vesperon la patro de malĉastadistoj sed, (Aj, miaj brilantaj steloj kaj korpo!) [13] iel superarkita plej alta ĉielo la aŭguro de mola reklamo! [14] Sed estis? Izoldo? Antaŭe kloakoj? La kverkoj malnovaj nun entorfiĝas dum ulmoj eksaltas el kie kuŝas trituroj. Falus' se vi volus, sed vi devas leviĝi: [15] kaj neniam finiĝos ĉi tia farso al sekularskribe feniksa fino. [16]

---

1. riverrun, https://ekstelu.info/riverrun/ ↩
2. unue unuopa persono nomoata, https://ekstelu.info/sir-tristram/ ↩
3. 'gorgios' in Georgio, https://ekstelu.info/oconee/ ↩
4. la elfajra voĉo timigos vin!, https://ekstelu.info/elfajro/ ↩
5. nathandjoe, https://ekstelu.info/fratinoj/ ↩

6. sonor-rondo, https://ekstelu.info/sonor-rondo/ ↩
7. la falo, https://ekstelu.info/la-falo/ ↩
8. mallongaj avizo,https://ekstelu.info/short-notice/ ↩
9. kiaj disputoj, https://ekstelu.info/sods-brood/ ↩
10. kiaj disputoj (daŭrigo) https://ekstelu.info/sods-brood-2/ ↩
11. sonoregondoj https://ekstelu.info/arms-apeal/ ↩
12. kasteloj ventolataj https://ekstelu.info/arms-apeal-2/ ↩
13. here here https://ekstelu.info/here-here/ ↩
14. fan-si-pan https://ekstelu.info/here-here-2/ ↩
15. where askes lay https://ekstelu.info/where-askes-lay/ ↩
16. feniksafino https://ekstelu.info/feniksafino/ ↩